


# CERBE kaj KORE



*Mi, la Verda Ligna Drako, tutkore kaj  
tutcerbe gratulas vin okaze de  
proksimiĝanta mia jaro!*

**KULTURA SUPLEMENTO  
AL LA REVUO "PONTO" N-RO 137**

***N-RO 35 (103), DECEMBRO 2023***

# Enhavo

## *Zamenhof-tage*

*Klara Ilutoviĉ* 3

## *75-jariĝo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj*

### *Tradukita prozo*

*Andrej Usaĉov.* Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj por infanoj kaj adoltoj. Trad. S. Paĥomov (daŭrigota) 4

### *Libroj*

Rezulto de 55-jara verkado. Recenzo de Nikolao Gudskov pri libro de Mikaelo Bronŝtejn “Mi vivas en la mondo malperfekta” 14

Naciaj lingvoj kiel planlingvoj, aŭ lingvokreado kiel politiko.  
Recenzo de Nikolao Gudskov pri libro de Florian Coulmas “Gardantoj de la lingvo” 26

### *Originala prozo*

*Tatjana Auderskaja.* Ŝtupoj de ekkono 15

### *Tradukita poezio*

*Andrej Dementjev.* Hodiaŭa tago. Trad. K. Ilutoviĉ 17

### *Tradukita prozo*

*Konstantin Paustovskij.* Ŝtala ringeto. Trad. Gennadij Ŝlepĉenko. 18

### *Akademio de Esperanto*

*François Lo Jacomo.* Konferenco de la Akademio 25

## Zamenhof-tage

Majstro, vin kaj vian verkon ni memoras,  
Vian venon en la mondon por esper'  
Pri pli bona homkuneco, kiu floras  
En la lingvo de la vivoplena ver'.

Esperanto plu varmigas kaj inspiras,  
Donas novajn fortojn por necesa pen',  
Esperanto ĉiam ion helan diras,  
Vigligante por pli inda vivelten'.

En la mondo l' vivo iĝis trostreĉita  
Ĉie ankaŭ por esperantista gent',  
Sed la lingvo por venkemo la spirita  
Verdas en la viv' je l' kora elokvent'.

Majstro, grandan al vi dankon pro donaco  
De la lingvo sub la verdebrila stel'!  
Via naskiĝtag' sur la amika spaco  
Lumu je bonesperiga sia bel'!

*Klara Ilutoviĉ*



## 75-jariĝo de la *Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj*



### *Tradukita prozo* **Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj por infanoj kaj adoltoj.**

*Andrej Usačov*<sup>1</sup>



*Rerakontis en Esperanto Sergeo  
Paĥomov, Kirov*

*La 10-an de decembro en 1948 jaro la  
Ĝenerala Asembleo de UN aprobis la Deklaracion  
de Homaj Rajtoj. Do, ĉi-jare estos 75 jara jubileo  
de tiu grava por la homaro dokumento.*

*Mi publikigas ĉi tie mian tradukon de  
rakontoj, kiuj tamen **jam estis presitaj** en dumonata liberesprimilo **Laŭte!** kiun  
redaktoris Christiane Baude. Entute 13 rakontoj. Mi opinias, ke la rakontojn legu  
kiel eble pli vasta publiko, ĉar temas pri homaj rajtoj. Aparte aktualas nun!*

*Ĉiuj korektoj, konsiloj kaj sugestoj estas bonvenaj!*

*Rakontoj estas pri Eta Homo kun verda haŭto (kvazaŭ vera  
esperantisto). Jes! Tamen ĝuste tiel presitas pri li en la 3-a rakonto. Eble spirite la  
Eta Homo jam estas esperantisto, kvankam verŝajne li ne scias pri Esperanto.*

*Ĉiuj ŝtatoj-membroj de UNO plenumu la Deklaracion, tamen ĉu vere kaj  
plene ĝi estas ie plenumata?*

*La demando aktualas por ĉiuj landoj diversgrade.*

---

<sup>1</sup> Andrej Usačov (nask. en 1958) estas populara rusa porinfana poeto kaj prozisto. La prezentita verko aperis ruse en 2008.

*Do la scio de la Deklaracio efektive necesas por geinfanoj kaj plenaĝuloj por ke la mondo estu pli justa kaj ni sciu ne nur niajn RAJTOJN sed ankaŭ la DEVOJN. Ĉar ni estas Homoj kaj Civitanoj de la mondo. Fakte esperantistioj ekde 1887 proklamis la samon. Mi legis la rakontojn kune kun mia filino kiam ŝi estis juna. Nun ŝi jam scias ke neniu rajtas ofendi, bati, humiligi ŝin.*

*S. Paĥomov*

## **Rakonto 1**

En unu granda urbo loĝis unu Eta Homo. Li estis malgranda-malgranda. Ankaŭ lia domo estis malgranda. Ankaŭ lia ĝardeno estis malgranda. Tage la Eta Homo laboris, sed vespere li zorgis pri tulipoj aŭ sidis sur la benko ĉe la pordego, fumis malgrandan pipeton, ĝojis ke ĉio ĉirkaŭe estas granda. Homoj estas grandaj, domoj estas grandaj, eĉ hundoj estas grandaj.

Ĉagrenis la Etan Homon nur tio ke Grandaj Homoj imagis ĉion ĉi tion malgranda: homoj, domoj, eĉ hundoj estas malgrandaj. Kaj la Etan Homon la Grandaj Homoj tute ne rimarkis, kvazaŭ li ne ekzistus. Ili povis ekpuŝi lin surstrate senpardone, aŭ trairi lian ĝardenon, piedpremite per siaj “elefantaj” kruroj liajn florojn.

– Kion vi faras?-kriis al ili la Eta Homo. –Bonvolu atenti! Sed la grandaj homoj senatente plu iris. Tiam la Eta Homo aĉetis por si hundon. Certe, li aĉetis tre malgrandan hundon, tamen kun tre laŭta voĉo. Kaj ĉiuj ekpreferis preterlasi lian domon.

– Strange estas – meditis la Eta Homo – La grandaj homoj timas kiam al ili iu BOJAS. Tamen ili absolute NENIUN ESTIMAS...

Unufoje la Eta Homo trovis en sia biblioteko malgrandan libron kun la titolo “Universala Deklaracio de la Rajtoj de Homo“. Li eksciis el ĝi ke ĉiuj homoj sciu siajn rajtojn, estimu unu la alian. La libro tre plaĉis al la Eta Homo. Li enketis samurbanojn pri la libro. Ve! Eĉ neniu aŭdis pri la Homaj Rajtoj.

– La grandaj homoj estas mirinde malkleraj –ekpensis la Eta Homo – Necesas do tion ŝanĝi. Kaj jen li ekiris al centra placo de la urbo kun granda plakato enmane: **ĈIUJ HOMOJ NASKIĜAS LIBERAJ KAJ EGALAJ. ĈIUJ HAVAS SAMAJN DIGNON KAJ RAJTOJN. ĈIUJ HAVAS RACION KAJ RILATU UNU AL LA ALIA KIEL GEFRATOJ.** Rapide ĉirkaŭ la plakato amasiĝis la urbanoj. – Pri kio ĉi tie skribitas? – demandis ili unu la alian, kvankam la Eta Homo skribis la literojn grandaj.

Ĉi tie estas skribita iu stultaĵo– deklaris unu Dika civitano. – La homoj ne povas naskiĝi egalaj. Ekzemple mi naskiĝinte pezis 4 kilogramojn 500 gramojn, sed mia najbaro pezis 3.100, kaj vi...

Aŭskultu! – diris la Eta Homo – Naskiĝi la egalaj ne signifas naskiĝi je la sama pezo aŭ staturato. Aŭ same la fortaj kaj belaj. Naskiĝi la egalaj signifas naskiĝi kiel Homoj, malgrandaj kaj nudaj, ĉar neniu ankoraŭ naskiĝis kiel Ministro kun paperujo aŭ Generalo kun epoletoj.

Povas esti – diris la Dika civitano – Tamen kial mi devas rilati al ĉiuj frate? Mi estis unusola infano en mia familio, do neniujn gefratojn mi havas!

Ankaŭ mi ne havas.– sopirĝemis la Eta Homo – Sed ĉiuj ni estas homoj, sekve ge-fratoj laŭ racio kaj deveno... Oni diras ke ĉiuj homoj devenis de Eva kaj Adamo, do estas ni parencoj inter ni, bedaŭrinde tre malproksimegaj.Vi, miaopinie, estas proksimume mia onklo 88-grada.

– Absurdo! – indignis la Dika civitano. – Mi estas ateisto. Mi ja scias ke ĉiuj homoj devenis de simio. Ankaŭ mi, ankaŭ Vi!

– Domaĝe – malgaje diris la Eta Homo – Tiukaze Vi estas mia iom-grada onklo laŭ simia parenca linio...

– Aŭskultu lian deliron! – ekkriis “la onklo”. Sed nek lin, nek la Etan Homon iu aŭskultis en la placo. Ĉiuj aktive penis ekscii pri la gradoj de la parenceco inter si. Tuj ekaperis multaj parencoj en iu ajn grado de la parenceco. Tiel la urbanoj interkonatiĝis kaj parencece invitadis unu la alian gastigi. Kaj la Eta Homo volvis la plakaton, ekiris hejmen, tre kontenta pri sia eta venko.



## Rakonto 2

Unufoje vespere la Eta Homo promenis kun sia hundo en skvaro. La hundo gaje kuris en herbejo kaj inter arbustoj. La Eta Homo ĝojis al la varma

vespero kaj grave fumis sian pipon. Subite li ekvidis knabon kurantan tra la skvaro kaj viron kun bastono en mano kiu postkuris la knabon.

Haltu!-ekkriis la Eta Homo al la viro. Sed la viro eĉ ne rigardis liaflanken. Tiam la Eta Homo sen meditoj ĵetis sin al piedoj de la viro kaj tiu falis sur teron...

Diablo prenu! – kriegis li – Ĉu Vi imagas kion mi nun faru al Vi? Sed la Eta Homo ne timis lin. –Ĉu Vi scias kio estas skribita en la Deklaracio de Homaj Rajtoj? **NENIU RAJTAS OFENDI ALIAN HOMON, HUMILIGI KAJ KRUELE PUNI !**

En kiu tia Dekoracio? – freneziĝis la viro. – Tiu fiknabo rompis mian fenestron per pilko do mi rajtas lin puni laŭ mia deziro.

Vi povas nur postuli pere de juĝo ke liaj gepatroj riparu Vian fenestron aŭ iel kompensu al Vi. – obstine diris la Eta Homo – Tamen Vi ne rajtas bati homon.

Nun ni rigardu ĉu rajtas mi aŭ ne rajtas – La viro jam levis sian manegon por frapi... Sed subite el arbustoj saltis eta hundo kaj ekbojis tiel laŭte ke la viro ellasis bastonon teren.

Ĉu mi sciis? – balbutis li – Mi tute ne vidis vian Duklaracion aŭ vian Delegacion. Eblas ke mi analfabetas!

Ankaŭ mia hundo ne legis la Deklaracion. Tamen ĝi ĵetis sin defendi min ĉar ĝi scias ke neniu rajtas ofendi homon.

Vaŭ-vaŭ – laŭte konsentis eta hundo kaj prenis per dentoj la ellasitan bastonon.

Ĉu iu scias: ĉu legis ĝin, ĉu ne?... Eble la hundo estas freneza! – respondis la viro kaj iris hejmen. Li decidis neniam plu ligi sin kun frenezaj mastroj kaj iliaj hundoj, sciantaj la Deklaracion de Homaj Rajtoj.

Sed la Eta Homo daŭrigis la promenadon meditante pri tio ke ne nepras esti analfabeta por estimi aliajn homojn. Antaŭ li kiel la pruvo pri ĉi tio kuris eta hundo kun bastono en la dentoj.

### Rakonto 3

La Eta Homo laboris kiel ĝardenisto. Verŝajne de tiu fakto ke li ekde infaneco zorgis pri floroj, aŭ laŭ alia kialo, lia haŭto estis verda. Kaj kiam li laboris en ĝardeno lin preskaŭ neniu rimarkis. Homoj mirinde rigardis surskribojn el floroj kiuj aperadis antaŭ iliaj okuloj: **ESTU ĈIAM LA SUNO !** aŭ **NIA URBO ESTAS LA PLEJ BELA EN LA MONDO !** aŭ ankoraŭ io.

La Eta Homo havis la staturon kiel floro. Ankaŭ liaj floroj kreskis pli rapide kaj pli bele ol ĉe aliaj ĝardenistoj. Kvankam li laboris ne malpli bone ol la aliaj, oni pagis al li tiel malmulte ke mono suffiĉis nur por malgranda peco de pano al si kaj malgranda peco de viando al hundo.

Vi estas malgranda, do Viaj bezonoj malgrandas – diris lia estraro.

Mia salajro ne estas granda sed la laboron mi havas tre interesan. – konsoliĝis li.

Same oni pagis al ceteraj ĝardenistoj. Malmulte. Kvankam ili laboris de mateno ĝis nokto, iam eĉ dumnokte. Precipe antaŭ festoj. Ĉar dum festoj la urbo aspektu plej bele. Unufoje, post laboro la ĝardenistojn kunvenigis la Estro de Urba Naturo kaj deklaris:

Morgaŭ ni havos feston. Nia kara kaj amata Urbestro havos jubileon. Estas la ordono por morgaŭa mateno beligi la gazonojn de nia urbo per surskriboj: “Nia Urbestro havas 60 jarojn! Hura!”

Ĉu estas ankaŭ la ordono pagi al ni la laboron? – demandis la Eta Homo. Tamen la Estro

De Urba Naturo ne atentis eĉ la demandon. Ĉar grandaj homoj malofte aŭdas la malgrandajn. Precipe la grandaj estroj. Precipe kiam la labora tago estas finita kaj tempas hejmen iri.

Tio estas indigninda – diris la Eta Homo al la ceteraj – En la Deklaracio de Homaj Rajtoj estas skribite: ĉiu homo rajtas ripozon kaj pripagon de sia laboro!

Kion fari – ekspiris la ĝardenistoj – Ni estas ja homoj malgrandaj.

Ĉu vi estas la malgrandaj? – ekridis la Eta Homo – Nu bone, ni faru al nia kara kaj amata Urbestro nian malgrandan donacon!...

Matene la Urbestro ekvidis el fenestro sur sia gazono la surskribon: Nia Urbestro estas 60-jara ...sed li ne scias la Deklaracion de Homaj Rajtoj! Post ĝi dumlonge de centra strato sekvis la surskriboj el floroj:

**ĈIU HOMO RAJTAS JE BONAJ KONDIĈOJ DE LABORO ! LA LABORTAGO NE ESTU TRO LONGA ! LA LIBERTEMPO ESTU PAGATA ! PRO LA SAMA LABORO HOMOJ HAVU LA EGALAN SALAJRON ! ĈIU RAJTAS LABORI KAJ ELEKTI LABORON LAŬ SIAJ POVO KAJ DEZIRO !**

La Urbestro tre koleriĝis. – Kio estas tio? – kriis li al siaj helpistoj. – Urĝe trovu ĉiujn ĝardenistojn kaj ĉion forprenu! La helpistoj de la Urbestro ekkuris serĉi la ĝardenistojn sed nenie ili estis: nek en gazonoj, nek en skvaroj. La ĝardenistoj ripozis hejme. Ĉar ja estis skribite en unu florbeto: **ĈIU HOMO RAJTAS RIPOZI. HURA !** La malgranda donaco de la ĝardenistoj ŝanĝis la humoron de la Urbestro. – Ĉi tio estas malordo! Ja homoj povas kompreni tion malvere!

Tamen la urbanoj promenantaj en la centra avenuo legis la frazojn el floroj kaj komprenis ĉion vere. Se estis iu kompreninta malvere do ĉi tiu estis la Estro de Milico-Polico. Li dum sia vivo nur kaptis kaj en-prizonigis homojn. Tial ankaŭ nun li komprenis ĉion alie. Anstataŭ: “urĝe trovu ĉiujn ĝardenistojn kaj ĉion forprenu”, la Estro de Polico komprenis tiel: ĉiujn ĝardenistojn aresti kaj ĉion forpreni!

Kaj rapide oni arestis ĝardenistojn kaj en-prizonigis. Ĉiujn, krom la Eta Homo. Ĉar li estis eta-eta... Ankaŭ por Polico malfacilas trovi etan homon en la granda urbo. La Eta Homo nenion sciis pri ĉi tio. Li trankvile akvumis florojn kiam oni kriis en la strato:

–Sensacio!

Laŭ la ordono de la Urbestro estas arestitaj ĉiuj ĝardenistoj! Cento da ili estas en la urba prizono! La Eta Homo tuj ekiris al la Estro de la Prizono.

– Mi postulas ke Vi tuj liberigu ĉiujn ĝardenistojn – deklaris li. – Ĉar ili estas senkulpaj!

– De kio ci ĉi tion scias? – miris la Estro de la Prizono. – Ĉu ankaŭ ci estas ĝardenisto?

– Jes, – fiere respondis la Eta Homo.



Oni enprizonigis ankaŭ lin. En la apartan ĉelon. Ĉar tie kie suferis la aliaj ĝardenistoj estis jam 100 homoj. Eksciinte pri la okazintaĵo la Urbestro terurigiĝis:

– Ja oni povas min malvere kompreni! Li ordonis :

– Tuj liberigi ĉiujn 100 ĝardenistojn! Kaj certe oni liberigis ĉiujn 100 ĝardenistojn, ĉiujn krom la Eta Homo. Ĉar li estis la 101-a, ja pri li oni nenion diris en gazetoj, nek en la ordono de la Urbestro. – Pri ci neniu ordono estas.-diris al li la Estro de la prizono. Tamen la Eta Homo decidis batali kaj sur muro de sia ĉelo skribis la vortojn el la Deklaracio: **NENIU RAJTAS EN-PRIZONIGI HOMON, SE LA HOMO NE KULPAS ! ĈIU RAJTAS JE JUSTA JUĜO.**

La Estro de la prizono postulis de siaj subuloj farbokovri la surskribon. Sed la Eta Homo denove ĝin gratis: NENIU RAJTAS...

– Aŭskultu,– diris la Prizon-estro – unue la frazo estas stulta, due ci difektas la muron. Trie la frazon ĉiukaze neniu vidas.

– Kial neniu? – respondis la Eta Homo – Ja Viaj subuloj vidas.

– Mi ordonos al ili vindi la okulojn – diris la Prizon-estro.

– Tamen Vi mem vidas kaj la fakto gravas – kontraŭdiris la Eta Homo.

– Sed ankaŭ mi mem al mi vindos la okulojn – diris la Prizon-estro. Li estis tre obstina. Sed ankaŭ Eta Homo estis obstina. Kaj post ĉiu nova farbokovro de la muro, sur ĝi denove tuj estis aperanta la sama surskribo. Tiel daŭris ĝis finiĝis farbo en la prizono.

Mi estimas obstinajn homojn,– konfesis la Prizon-estro – Kaj se ci ne kulpus, mi plezure cin liberigus...

Se mi kulpus, ĉu mi mem venus en la prizanon? – demandis la Eta Homo.

– Efektive,– miris la Prizonestro, ekrigardis la muron kaj aldonis: – Bone, iru...Memoru: mi vidis cin neniam! La Eta Homo ekridetis kaj rapide ekkuris hejmen nutri sian etan hundon kaj akvigi florojn. La saman tagon la Urbestro vokis al si la Prizonestron kaj la Estron de polico, kaj nomis ilin stultuloj:

– Vi malhonorigis min en la urbo. Necesus vin mem malliberigi. La Estro de polico esploris kaj petegis pardonon. Nur la Prizonestro ofendiĝis kaj diris:

– Neniu rajtas malliberigi homon senkulpan kiel parolis unu mia estimata malliberulo.

#### Rakonto 4

Unufoje antaŭ unu dometo haltis buldozo.

– Kies estas la domaĉo? – krietis la buldozisto kaj ekvidinte elirintan mastron, anoncis:

Kunprenu rapide vian havaĵon! Ĉi tie estos konstruita vojo por Nova Rapida Tramo.

La domo estas mia, mi ĉi tie loĝas kaj nenien foriros! – La Eta Homo sidiĝis sur benkon ĉe la domo, kontraŭ la buldozo. La buldozisto ne sciis kion fari. Post iom li forveturis, sed baldaŭ revenis kun la Ĉefa Urba Konstruisto, la Ĉefa Planisto kaj la Estro de polico.

– Strange, – balbutis la Ĉefa Planisto, rigardante mapon de la urbo – Kiam ni planis la vojon, la domon mi ial ne rimarkis.

– Okazis eraro – li turnis sin al la Eta Homo – Tamen estas la plano de la konstruado, subskribita de la Urbestro, do vi forlasu la teritorion.

– Por vi ĉi tio estas la teritorio, – diris la Eta Homo – Sed por mi estas la domo! Ĝin konstruis mia avo. En ĝi loĝis miaj gepatroj kaj nun loĝas mi.

– Ĉu ni parolu kun li? Forigi lin el de ĉi tie kaj la afero estos finita! – La Estro de polico aliris la Etan Homon kaj forigis la benkon de sub li.

– Tuj revenigu mian benkon, – koleriĝis la Eta Homo – En la Deklaracio de Homaj Rajtoj estas dirite: **ĈIU HOMO RAJTAS POSEDI HAVAĴON, KAJ NENIU POVAS FORPRENI PERSONAJN AĴOJN DE LI!**

– Mi scias neniun deklaron, – diris la Estro de polico eksidinte sur la forigitan benkon – Mi scias la postulon de la urba estraro!

– Aŭskultu, – diris al Eta Homo la Ĉefa Konstruisto – Se por vi valoras via domo, mi povas transporti vin kune kun via havaĵo, domo ĉien ajn!

– Sed mia ĝardeno? – demandis la Eta Homo – Kaj la floroj?

– Mia edzino havas hodiaŭ naskiĝtagon, – deklaris la Estro de polico – Kiom kostas viaj floroj? Mi aĉetos ĉiujn flo...

La Estro de polico ne finis la frazon ĉar falis sur teren, la Eta Homo forpelis de li la benkon.

Ĉi tiuj estas mia nova speco de tulipoj! – kriis la Eta Homo – Mi kreskigis ilin dum sep jaroj! Kaj ĉiu el ili kostas multe pli ol via Rapideca Tramo kune kun via Buldozo!

Mi forveturu! – diris buldozisto – Mia salajro ne estas granda. Ankaŭ Estro de polico

post iom de pensado-dubado forveturis. La restintaj Ĉefaj Konstruisto kaj Planisto denove komencis esplori la mapon de la urbo.

Interalie – diris al ili la Eta Homo – via planita vojo estas kurba. Ĉi tio vidatas sen la mapo. Se konstrui ĝin rekta, do ĝi vojos apud tiu domo...

Mi scias – respondis la Planisto – Sed tiu estas la domo de Helpisto de la Urbestro kaj li ne ŝatas bruon. Post ioma diskuto la ne-invitataj gastoj forveturis. Fin-fine oni decidis konstrui la Vojon en alia loko. La Eta Homo tre ĝojis pri la fakto. Ankaŭ li ne ŝatis bruajn Rapidecajn Tramojn.

## Rakonto 5

Unufoje en la urbo oni decidis aranĝi Grandan Ekspozicion de Floroj. La Eta Homo laboris dum semajno sen ripozo. La Ekspozicio estis aranĝita tiel bela ke al ĝia prezentado alvenis Televido. Sed kiam alvenis la Televido, iu decidis forpeli ĝardenistojn por ili forestu en la Televida raporto. Kaj ilin ĉiujn oni forigis krom la Eta Homo kiu ĉi-momente tondis lastan arbuston de rozoj. Li estis tiom okupita pri la afero ke eĉ ne rimarkis telekameraiston, nek reĝisoron. Kiam li finis sian laboron, li ekvidis ke oni filmas lin, li tuj kaŝis sin en floroj.

Krom la Televido al la prezentado alvenis la Estro de Urba Naturo kaj Helpisto de Urbestro kun granda ĝardena tondilo. Ili certe ne scipovis tondi florojn tamen ili ja lerte tondis ceremoniajn striojn dum malfermo de ioj ajn.

La Estro de Urba Naturo longe rakontis al telespektantoj pri siaj sukcesoj por bonstato de l'urbo.

– Ĝuste tiel – subtenis lin Helpisto de Urbestro – Estas fi-homoj kiuj anstataŭ kreskigi same belegajn rozojn (li montris la arbuston kie kaŝis sin la Eta Homo), faras diversajn huliganajn surskribojn en urbaj gazonoj.

Aŭdante ĉi tion La Eta Homo eliris el la arbusto kaj diris al la Helpisto de Urbestro:

– Vi diras malveron. La surskriboj ne estas huliganaj. La vortoj estas el la Deklaracio de Homaj Rajtoj, pri kiu en nia urbo neniu ion scias.

– Kiu li estas ? De kie li ĉi tie aperis? – miris la Helpisto.

– Ĉu ci havas iun rajton – ekkriis la Estro de Urba Naturo – diri al la Helpisto de nia Urbestro la absurdaĵon ?

**ĈIU HOMO RAJTAS HAVI PROPAN OPINION, ANKAŭ DIRITON KION OPINIAS!** – firme diris La Eta Homo. – Tiel estas skribite en la Deklaracio...

For! For!.. Forprenu lin el la filmado! – svingis per manoj la reĝisoro. Sed La Eta Homo trankvile daŭris rekte al kamerao:

– Tie estas dirite ankaŭ pri aliaj rajtoj de homoj. Ekzemple, **ĈIU HOMO RAJTAS KONFESI SIAN RELIGION!** – tio estas viziti preĝejon kaj preĝi Dion kiun la homo kredas. Kaj ankoraŭ ĉiu el ni rajtas...

Kiuj rajtoj ankoraŭ estas, la telespektantoj ne sukcesis ekscii, ĉar la elsendo subite ĉesis. Laŭ teknikaj kialoj, tiel eksplikis la televidisto. Kiam la teleprogramo ekaperis denove, La Eta Homo jam forestis. Ankaŭ same forestis la Helpisto kaj la Estro de Urba Naturo. Anstataŭ ili oni montris du profesorojn kiuj meditis pri nuna varmega vetero kaj pri sekvoj de drinkado de biero aŭ limonado dum la vetero. La rezulto de tio estas halucinoj pri verdaj hometoj. La profesoroj interkonsentiĝis, tamen ekdiskutis pri kvanto de la hometoj. La aĝa profesoro deklaris ke kutime halucinĝas de kvin ĝis dek hometoj. Sed la juna profesoro asertis ke nur unu aŭ du.

– Aŭskultu, juna homo, – diris la aĝa – Sendube mi drinkis pli multe da biero kaj limonado do mi scias kion mi diras! La juna profesoro ofendiĝis: – ĉiu homo rajtas opinii, kiel diris la hometo... Li tuj korektis sin: – ...kiu estis hodiaŭ nur halucinaĵo por ni ĉiuj.

Povas esti ke ankaŭ la plejparto de la urbanoj opiniis La Etan Homon kiel la halucinaĵo. Tamen sekvatage en televido unu De-Ĉiuj-Estimata-Generalo deklaris ke li neniam drinkinta bieron kaj limonadon, vidis per propraj okuloj LA ETAN VERDAN HOMON.

– Ĉi tiu ETA HOMO estas SPIONO! – deklaris la Generalo. – Ĉiuj spektis kiel li neatendite aperis en la televid-ekrano. Li estas TIOM ETA KAJ VERDA por pli bone SIN MASKI. Tia spiono povas facile rampi en iu sekreta gazono, enrampi iun sekretan truon kaj ekscii militan sekreton.

– Necesas urĝe, – daŭris la Generalo – forloĝigi ĉiujn etajn verdajn spionojn el nia granda sekreta urbo, sed pli bone elmigrigi ilin el nia granda sekreta lando!

La Eta Homo ne havis televidilon kaj li tre miris kiam la urbanoj antaŭe lin ne konantaj, komencis tuj frustradi inter si kaj montri lin per fingro. Sed liaj malmultaj konatuloj male ĉesis rimarki lin kaj preferis iri aliflanke de strato kiam

vidis lin. Eĉ amikoj-ĝardenistoj klopodis eviti lin. Kaj la Estro de Urba Naturo rekte anoncis ke maldungas lin ĉar li estas spiono. Nur tiam li komprenis la aferon kaj tre koleriĝinta vizitis la televidon. Tamen oni ne enlasis lin. – Ni ne enlasu ĉi tien spionojn – diris deĵorinta policisto ĉe la enirejo. Tiam La Eta Homo vizitis Juĝejon.

Unu Generalo nomis min spiono, – diris li al juĝisto. – Mi deziras postuli de li publikan pardonpeton.

– Laŭ la leĝo, certe, la generalo pardonpetu de vi, – diris la Juĝisto. Ĉi tiu estis Tre Saĝa Juĝisto. – Sed ĉu vi opinias ke De-Ĉiuj-Estimata-Generalo petos pardonon de malfama eta homo?

– Certe! – diris La Eta Homo. – Diru, kiom estos double du?

– Certe kvar, – respondis la Juĝisto. Ĉi tiu estis la Tre Saĝa Juĝisto.

– Kiom estos double du por la generalo?

– Same kvar. Se li scipovas kalkuli.

– Sed kiom por la Prezidento? – daŭrigis La Eta Homo.

– Same kvar, – estis embarasita la juĝisto. – Por ĉiuj double du estas kvar!

– Jen la afero! – diris La Eta Homo. – Por ĉiuj double du estas kvar, ĉar estas la LEĜO.

– Vi kiel juĝisto devu scii ke leĝoj ESTAS DEVIGATAJ por ĉiuj!

– Pardonu, de kio vi tion scias? – konfuziĝis la Juĝisto.

Mi tralegis pri tio en la Deklaracio de Homaj Rajtoj, – respondis La Eta Homo. – Ĝi deklaras ke **ĈIU HOMO RAJTAS SERĈI DEFENDON EN JUĜEJO! LA LEĜOJ ESTU EGALAJ POR ĈIUJ KAJ DEFENDU ĈIUN!**

Ĉu vi donos al mi legi la Deklaracion? – petis la Juĝisto. Li estis Tre Saĝa Juĝisto.

Post kelkaj tagoj De-Ĉiuj-Estimata-Generalo estis vokita al la juĝejo. Li venis kune kun aliaj generaloj kaj oficiroj. La Eta Homo povis veni nur kun sia eta hundo, sed oni ne enlasis hundojn en la juĝejon. Tial li venis kun bukedo el floroj, por morala subteno.

La juĝisto prezentis la postulon de La Eta Homo ke la generala pardonpetu. Tamen la generalo ne deziris.

En mia ĝardeno iu ŝtelas kukumojn, do la sekureco de nia lando suferas, – deklaris li. – Kiu ankoraŭ povas ŝteli tiel nevideble kukumojn se ne etaj verdaj spionoj? Tial mi postulis ilin formigrigi el la lando aŭ kvankam el la urbo.

Ĉi tio estas via supozo, sed kulpon de la homo povas pruvi nur Juĝo, – diris la Juĝisto.

Post tio li donis la vorton al La Eta Homo.

Estimata Generalo, – diris li. – ofendis ne nur min. Li ofendis ĉiujn, trioble rompinte la Deklaracion de Hom-Rajtoj, en kiu estas skribite:

**1. ĈIU HOMO POVAS LOĜI TIE KIE LA HOMO DEZIRAS.**

**2. NENIU RAJTAS FORPELI HOMON EL LANDO, EN KIU LI LOĜAS.**

**3. ĈIU HOMO RAJTAS ESTI SENKULPA ĜIS PRUVO EN JUĜEJO.**

Alie, – diris La Eta Homo, – Ankaŭ De-Ĉiuj-Estimatan-Generalon ĉiu povas kulpigi pri spioneco. En niaj magazenoj ofte malaperas blanka pano kaj

blanka sukero. Kiu do povas ŝteli ilin pli facile kaj nevideble ol BLANKA, DE-ĈIUJ-ESTIMATA-GENERALO?

Tio estas la indigniga! – kriis la generalo, kaj liaj kunarmeanoj. – Li pardon-petu!

Mi petas pardonon de Estimata Generalo por la supozo, – diris La Eta Homo, – Sed mi postulas ke ankaŭ la generalo pardon-petu de mi ... kaj ĉiuj telespektintoj.

La juĝo aprobis la postulon de La Eta Homo la leĝa. De-Ĉiuj-Estimata-Generalo kun aliaj generaloj kaj oficiroj foriris al televido.

Sed La Eta Homo ekiris hejmen kun bela granda bukedo, per kiu li gratulis sin okaze de la venko.

## Rakonto 6

Post sia parolado en juĝejo kaj publika pardonpeto de De-Ĉiuj-Estimata-Generalo la Eta Homo iĝis granda famulo. Kiam li iris strate, homoj tuj ĉirkaŭis lin kaj demandadis. Ilin tre interesis kiel la Eta Homo kreskigas siajn belegajn florojn, kiun glaciaĵon li ŝatas? Sed ĵurnalistoj demandis pri lia nacieco, el kiu familio li devenas, kiujn politikajn preferojn li havas?

– Respondu, ĉu vi batalas por homaj rajtoj ĉar vi havas verdan koloron de haŭto?

– Ĉu la koloro gravas? – miris la Eta Homo. – En la Deklaracio de Hom-Rajtoj diritas:

**NE GRAVAS: KIUJN HAŬT-KOLORON KAJ NACIECON VI HAVAS, KIUN LINGVON VI PAROLAS, KIUJN POLITIKAN OPINION KAJ RELIGION VI HAVAS, KAJ EL KIU FAMILIO ESTAS.**

**NE GRAVAS: ĈU VI ESTAS LA RIĈA AŬ LA POVRA, VIRO AŬ INO KAJ LANDO DE LOĜADO ĈAR ĈIUJ RAJTOJ KAJ LIBEROJ NOTITAJ EN LA DEKLARACIO APARTENAS AL ĈIU HOMO!**

Ĝuste tial, – klarigis la Eta Homo, – Ĝi nomiĝas **LA UNIVERSALA** ĉar estas skribita **POR ĈIUJ!**

– Kial vi kredas – oni demandis lin unufoje, – ke ĉiuj rajtoj notitaj en via Deklaracio estas la raciaj?


– Ĉar mi estas ĝardenisto, – respondis la Eta Homo, – do mi scias ke en la naturo ĉio estas racia. Rigardu ĉiun ajn florbedon, vi vidu kiel pace unu apud la alia kreskas floroj blankaj, flavaj, ruĝaj. Por ili ĉiuj egale radias suno kaj egale pluvus. Homoj ofte opinias ke unuj el ili estas pli altaj kaj pli belaj ol la aliaj. Estas homoj kiuj desegnas kvin-angulajn stelojn kaj ili ne ŝatas tiujn kiuj desegnas la ses-angulajn. Sed la triaj ne ŝatas tiujn kiuj pentras la kvin-angulajn. Se homoj pli atente observus florojn, ili vidus ke ekzistas floroj kun kvin, ses, kaj eĉ dekdu petaloj. Ĉiuj ili estas diversaj same kiel la homoj... Ĉar kaj tiuj kaj la aliaj estas kreaĵoj de Naturo. Aŭ de Dio.

Sed kiun Dion vi kredas? Ĉu Kriston, ĉu Alahon aŭ Budhon? – tuj reagis ĵurnalistoj.

Mi kredas, – respondis la Eta Homo, – Ke Dio kreinta tiom da diversaj floroj, arboj kaj homoj estis bona Ĝardenisto.

*Daŭrigo sekvos*

## Rezulto de la 55-jara verkado



Aperis grandega libro – elektitaj poemoj de Mikaelo Bronŝtejn, en kiu estas kolektitaj liaj poeziaj kreaĵoj, faritaj inter 1967 kaj 2023. Laŭ asertoj de la aŭtoro, en la libro en kronologia ordo estas prezentataj proksimume kvarono de liaj poemoj (inkluzive tiujn, kiuj fariĝis kantotekstoj).

La elekto de la poemoj estas aŭtora, do, povas ne koincidi kun preferoj de la legantoj: ekzemple, ĉeestas “Zimbabve”, sed forestas brilaj politikaj satiroj (pri kiuj ja Bronŝtejn ĉiam estis majstro!) – eble, li opinias, ke ilia

aktualeco foriris, sed li ja eraras: ofte ĝuste tiaj verkoj plej bone karakterizas kaj la epokon, kaj la poezian talenton, kaj restas vivi dum jarmiloj (Aristofano, Juvenalo, Swifto...). Nu, vere, eĉ en 500-paĝan libron ne povis eniri ĉio de la poeto, kiun neniam ĉesis verki dum pli ol duonjarcento!

La kronologia prezento de la poemoj permesas sekvi evoluon de la verkado de la poeto, evoluon de lia talento kaj uzataj poeziaj rimedoj. Evidentas, ke li neniam perferdis la klasikajn poeziajn principojn, kaj ne serĉis plifaciligajn vojojn en la poezio! La libro ĉiam denove pravas, ke temas pri unu el la plej grandaj kaj gravaj por Esperanto-kulturo poetoj.

La sola manko de la libro (temas pri la eldonkvalito!) estas iom tro malgranda literaro, specife kiam temas pri la datindikoj, kiujn sen forta lupeo legi ne eblas. Tio iom strangas, ĉar sur la paĝoj restas multe da libera spaco, kaj por engaĝigo kun pli grandaj literoj, sed kun la sama paĝokvanto problemoj ne estus.

Ĉiuokaze, dankon al la aŭtoro kaj la eldonejo pro ebleco ĝui la plej bonajn verkojn de nia amata poeto en unu granda volumo!



*Nikolao Gudskov*

*Mikaelo Bronŝtejn. Mi vivas en la mondo malperfekta. Ars Libri, Lublin, Pollando, 2023. 509 p. ISBN 978-83-6369894-2*



*Originala prozo*  
**Tatjana Auderskaja,**  
**Odeso**  
**Ŝtupoj de ekkono**

*– Jen vi kreis novan planedon  
kun ĝia loĝantaro. Sed por kio?  
Kian utilon tio alportos por la Kosmo?  
– La solaj substancoj, kiujn nature  
povos  
produkti ĉiuj tieaj enloĝantoj, estas  
amoniako, indolo, skatolo k.s.  
Tio tute sufiĉos por rezervi al ili  
neanstataŭeblan lokon en la vasta  
paletro de nia multfaceta Kosmo.  
(El neaperigita intervjuo kun la Kreanto)*

Hodiaŭ mi ricevis novan interesan taskon: elbredi memekstermantan estaĵon. Antaŭe ni okazigis tiajn esplorojn en universa skalo: produktis planedon, kiu evoluis ĝis certa grado, kaj poste memekstermis lasante por ni kelkajn utilajn substancojn, kiujn estus neoportune aŭ pli multekoste ricevi alimaniere. Tamen, kelkaj tiaj provoj fiaskis per eksplodo aŭ eligo de tute ne utilaj kaj eĉ nocaj substancoj. Tial la gvidantaro de nia esplorinstituto decidis fermi tiun direkton kaj transiri al pli multpromesa problemo: kreado de konstantaj planedoj kun ŝanĝebla loĝantaro, kiu produktos bezonatajn substancojn en certaj kvantoj dum certa tempodaŭro, kaj poste memekstermiĝos, liberigante la medion por novaj enloĝantoj. La metodo multe pli prudenta kaj ŝparema.

\*\*\*

Post kelkaj provoj rezultigis vertikala organika estaĵo, kapabla memstare multobliĝi kaj produkti el la ĉirkaŭa medio certajn utilajn por ni substancojn, ekz., ureo, indolo kaj skatolo, ege malpli koste ol se ni provus sintezigi ilin. Post ricevo de sufiĉa kvanto da substanco la programita konduto enŝaltiĝas – kaj la estaĵoj liberigas la surfacon de sia planedo por nova populacio, produktanta novajn necesajn al ni aĵojn. Tute simple kaj facile.

Dum la tempo de sia ekzistado la populacio formas en si mem iujn rilatojn, nociojn, inkl. rilate sin mem kaj sia loko en la Kosmo. Komprenoble, ili opinias sin la krono de kreaĵoj, sed tamen serĉas, kiu ja kreis ilin. Foje mi por amuzo konektiĝas al ilia komuna menso kaj aŭskultas, kiel ili nomas min: Alaho, Jehovo, Cebaoto, Enlilo... kaj multaj, multaj aliaj vortoj. Kiel bone, ke ni, doninte al ili konscion, limigis ĝin al la eblo esplori kaj ŝanĝi nur la ĉirkaŭan mondon, sed ne sin mem. La esploro de sia propra cerbo, siaj deziroj kaj streboj ne eblas por ili. Aliel ili fariĝus memstaraj, ne plu submetus sin al nia kontrolo.. kaj ne plenumus la agojn, por kiuj ili estis kreitaj. Sed por kio ili tiam estus bezonataj?

\*\*\*

Mi okupiĝas pri kreado de virusoj. La temo estas tre multpromesa, donanta vastegajn perspektivojn en diversaj sferoj de vivo. Ne nur en genetiko kaj medicino, kiel opinias multaj; ekz., ni en nia branĉo okupiĝas pri kreado de nanomaterialoj surbaze de virusoj por molekula elektroniko, kie virusoj funkcias kiel portantoj aŭ kiel ŝablonoj por krei novajn materialojn. Niaj artefaritaj virusoj, diference de la naturaj, estas facile elimineblaj: endas nur distranĉi iliajn DNA-ĉenojn, kion ni jam delonge scipovas fari. Jam ne malproksimas la tempo, kiam ni same facile povos ekstermi naturajn malsanigajn virusojn. Tio estos grandega venko de la Homo super Naturo.

\*\*\*

La Nobelpremion pri medicino en la jaro 2/// gajnis XXX YYY el ZZZ pro malkovro de metodo de malaktivigo de naturaj malsanigaj virusoj. Dum la pasintaj jardekoj fantaste kreskis la bonstato de l' homaro, liberigita de malsanoj ne nur propraj, sed ankaŭ de tiuj, kiuj atakas animalojn kaj vegetaĵojn bezonatajn por Homo. Fin-fine la homa vivo ĉesis dependi de hazardaj faktoroj kaj jam apartenas nur al li mem!

\*\*\*

Okaze de sukcesa finiĝo de la projekto pri kreado de memekstermanta estaĵo produktanta la substancojn A, B kaj C, lige kun eltrovo de alia, pli ekonomie profita metodo de ricevado de tiuj substancoj,

NI DECIDIS:

- a) Realigi la programon de memekstermo de tiuj estaĵoj sur la esplorkampo ☼☼☼
- b) Plene rasti, purigi kaj desinfecti la nomitan esplorkampon ☼☼☼
- c) Pri la plenumo raporti

Subskribo:

Sigelo:

d)

\*\*\*

El la raporto de la mekanismo NPG:

... rezulte de okazigitaj aranĝoj estas forigitaj organikaj estaĵoj, kiuj realigis eksperimentojn pri kreo kaj apliko de aliaj organikaj estaĵoj, okupintaj la teritoriojn nature destinitajn por disvolvo kaj evoluo de neorganika formo de ekzistado kiel la supera formo de ekzistado de materio kaj energio.

Tiamaniere, la vivareo por nia civilizacio jam estas rastita kaj atendas nin.

GLORON AL NI!

23-an de oktobro 2023







**Andrej Dementjev (1928-2018)**

**Сегодняшний день**

Чтобы сердце минувшим не ранить  
И не жечь его поздним огнём,  
Не будите уснувшую память,  
А живите сегодняшним днём.

Вас судьба одарила любовью,  
Осенила волшебным крылом?  
Не гадайте, что ждёт вас обоих,  
А живите сегодняшним днём.

Как прекрасно двум родственным  
душам  
В целом мире остаться вдвоём.  
Не терзайтесь былым и грядущим,  
А живите сегодняшним днём.

**Hodiaŭa tago**

Ke ne vundu iamo la koron  
Kaj ne ŝiru ĝin tardo de plag',  
Vanas vekoj dormantan memoron.  
Nur hodiaŭ vivindas la tag'.

Vin per am' benis via vivbordo,  
Aŭreolis per sorĉo de mag' –  
Por vi ambaŭ ne gravu la sorto.  
Nur hodiaŭ vivindas la tag'.

Ege belas por du amrenkontoj  
En duop' resti tra l' monda svag'.  
Ne turmentu vin intoj kaj ontoj.  
Nur hodiaŭ vivindas la tag'.

**Tradukis Klara Ilutoviĉ,  
Elektrostalo**



## Tradukita prozo

### Konstantin Paustovskij



**Konstantin Georgieviĉ Paŭstovskij (1892-1968)** – ukraindevena sovetia verkisto, klasikulo de la rusa literaturo de la 20-a jarcento. En sia kreado li rakontis pri interesaj homoj kaj lokoj, verkis “beletran geografion”, rakontis pri gravaj eventoj de la historio, prikantis belecon de la naturo, kaj foje ankaŭ verkis edifajn fabelojn kaj rakontojn por infanoj.

Konstantin Paŭstovskij naskiĝis en Moskvo, sed baldaŭ la familio transloĝiĝis al sia devenurbo Kievo. Li diplomiĝis en klasika gimnazio en Kievo. Estante studento de la gimnazio, li verkas sian unuan rakonton «Surakve», kiu estis publikigita en kieva revuo «Fajroj». En 1912 li iĝas studento de Kieva universitato, sed baldaŭ daŭrigas sian lernadon en Moskva universitato en jura fakultato. Tamen li ne sukcesis diplomiĝi ĉar komenciĝis la 1-a mondmilito. La juna verkisto ne trafis en fronton pro sia miopeco, sed militservis en lazaretraĵo kiel flegisto. Poste Paŭstovskij multe vojaĝis tra Rusio, kaj siajn impresojn fiksas en papero. Apartaj rakontoj aperadis en gazetoj, sed la unua lia libroforma rakontaro «Kontraŭdirektaj ŝipoj» estis eldonita en 1928. Post lia novelo «Kara-Bugaz», publikigita en 1932 en eldonejo «Juna gvardio», li iĝis populara inter sovetiaj verkistoj.

Dum la 2-a mondmilito Konstantin Paŭstovskij laboris kiel milita korespondanto.

En mezo de 1950-aj jaroj Paŭstovskij jam iĝis mondfama verkisto. En 1965, 67 kaj 68 li estis trifoje nomumita por Nobel-premio pri literaturo. En tiu tempo li multe vojaĝis tra Eŭropo.

Al li tre plaĉis la naturo de Meza Rusio, kie li pasigis multe da tempo. Tio estas, unuavice, la loko Solotĉa en Rjazana provinco kaj urbeto Tarusa en Kaluga provinco. La mez-rusia naturo inspiris lin verki tiajn rakontojn, kiel «Kato-ŝtelisto», «Neĝo», «Mela nazo». Pluraj lirikaj kaj pejzaĝ-prozaj rakontoj de Paustovskij eniras la lernejan programon de la rusa literaturo kiel la plej altaj specimenoj de la koncerna stilo.

Entute dektri verkoj de Paŭstovskij fariĝis bazoj por filmoj.

Li neniam perfidis honestecon: li estis ĝenerale lojala al la povo, tamen ne fariĝis membro de la partio, neniam aliĝis al konjunkturaj fi-kampanjoj, sed, male, subskribis leterojn defende al persekutataj kulturagantoj ks. Kaj opinio de la estimata de ĉiuj verkisto havis certan pezon kaj influis pozitive!

La koro de la verkisto haltis je la 14-an de julio 1968. Kaŭzo de la morto estis vica koratako. Paŭstovskij estas entombigita en la urbeto Tarusa.

Nomon Konstantin Paŭstovskij ricevis unu el la etaj planedoj, kiun oni malkovris en 1970-aj jaroj.

## La ŝtala ringeto.

Avo Kuzma loĝis kun sia nepino Varja en eta vilaĝo Mohovoje tute ĉe rando de arbaro. Nuna vintro estis severa, kun forta vento kaj abunda neĝo. Dum la vintro neniam okazis varmaj tagoj, kaj ne gutis hastema degelakvo de sur tabulaj tegmentoj. Nokte en la arbaro ofte hurlis tre frostiĝintaj lupoj. La avo Kuzma diris, ke tiuj hurlas pro envio al la homoj: la lupoj ankaŭ volas almenaŭ portempe loĝi en kabano, kuŝi ĉe forno, iomete grati kaj varmigi sian frostiĝintan hirtan felon.

Meze de la vintro ĉe la avo elĉerpiĝis malaltkvalita tabako. La avo ofte tusis, plendis pri malforta sano, kaj diris, ke se eblus almenaŭ kelkfoje enspiri fumon de la tabako, tiam lia farto tuj iĝus pli bona.

Dimanĉe Varja ekiris en najbaran vilaĝon Perebori por akiri la tabakon por la avo.

Apud la vilaĝo troviĝis fervojo. Varja aĉetis la tabakon, enŝovis tiun en indienan saketon, kaj ekiris en fervojstacion por spekti trajnojn. En Perebori la trajnoj haltis tre malofte. Preskaŭ ĉiam tiuj preterpasis kun grincado kaj bruego.

Sur la kajo sidis du soldatoj. Unu el ili estis barba, kun la gaja griza okulo. Ekmuĝis vaporlokomotivo. Jam estis vidate kiel ĝi, elegante vaporon, furioze strebas al la fervojstacio el post fora nigra arbaro.

- Eksprestrajno! – diris la barba soldato. – Singardu, knabineto, la trajno forblovos vin, kaj vi forflugos ĉielen.

La vaporlokomotivo plenforte atingis la fervojstacion. Neĝo ekturmiĝis kaj blindigis la knabinon. Poste radoj de la trajno ekis komuniĝi per frapetkodo, kaj penis kuratingi unuj la aliajn. Varja ambaŭmane kroĉis lanternan kolonon, kaj fermis la okulojn: vere, ŝi havis ŝancon leviĝi super la tero, kaj sekvi la trajnon. Post kiam la trajno preterveturis, kaj neĝa polvo ankoraŭ turniĝis enaere, kaj iomete alteriĝis, la barba soldato demandis Varja-n:

– Kio troviĝas en via saketo, ĉu tabako?

– Tabako – respondis Varja.

– Ĉu vi povas vendi ĝin? Mi tre volas fumi.

– Avo Kuzma malpermesis vendi ĝin, – severe respondis Varja. – Ĝi estas necesa kontraŭ lia tusado.

– Eh, vi, – diris la soldato, – la floreto-petaletoj! Tre serioza!

– Sed viprenu tiom, kiom necesas al vi, – Varja diris kaj etendis la saketon al la soldato. – Fumu!

La soldato deŝutis manplenon da tabako en poŝon de sia soldatmantelo, kunvolvis dikan cigaredon, ekfumis, prenis Varja-n je ŝia mentono, kaj subridante, ekrigardis ŝiajn blujajn okulojn.

– Eh vi, – li ripetis, – penso kun la harligetoj! Kion donaci al vi? Ĉu jen tion?

La soldato elprenis el poŝo de sia soldatmantelo ŝtalan ringeton, forblovis for de ĝi pecetojn de tabako kaj salo, frotis ĝin per maniko de la soldatmantelo, kaj surmetis la ringeton sur la mezan fingron de Varja:

– Portu ĝin je sano! La ringeto estas la tute mirakla. Rigardu, kiel ĝi brilas!



– Pro kio, oĉjo, ĝi estas tia mirakla? – demandis Varja, kaj konfuzo ruĝiĝis.

– Pro tio, – respondis la soldato, – ke, se vi portos tiun sur la meza fingro, ĝi alportos sanon al vi kaj via avo Kuzma. Sed se vi surmetos la ringeton sur la ringan fingron, – la soldato ektiris Varja-n je la frostiĝinta ruĝa fingro, – vin vizitos granda ĝojo. Aŭ, ekzemple, se vi ekvolos spekti la tutan mondon kun ĝiaj

mirakloj, surmetu la ringeton sur montran fingron – nepre vi ĉion ekvidos! – Ĉu vere? – demandis Varja.

– Vi kredu al li, – el post stara kolumo de soldatmantelo diris alia soldato. – Li estas sorĉisto. Ĉu vi aŭdis la vorton?

– Aŭdis.

– Nu, bone! – ekridis la soldato. Li estas sperta sapeisto. Eĉ nenia mino sukcesis mortigi lin!

– Dankon! – diris Varja, kaj tuj kuris al sia Mohovoe.

Ekblovis vento, ekneĝis. Varja tuŝis la ringeton, returnis ĝin, kaj rigardis, kiel tiu brilas pro vintra lumo.

«Kial la soldato forgesis diri al mi pri la etfingro? – ŝi ekpensis. – Kio okazos tiam? Se mi provos surmeti la ringeton sur la etan fingron». Ŝi surfingrigis la ringeton. Sed la etfingro estis tre maldika, kaj la ringeto falis de sur la fingro en profundan neĝtavolon apud padeto, kaj tuj plonĝis ĝis neĝa fundo.

Varja ekoĥis, kaj tuj komencis permane disrasti neĝon. Sed la ringeto ne estis vidata. Pro frosto la fingroj de Varja bluiĝis kaj jam ne fleksiĝis.

Varja ekploris. Malaperis la ringeto! Do, nun ne estos sana avo Kuzma, kaj ŝi ne ekhavos grandan ĝojon, kaj ŝi ne ekvidos la tutan mondon kun ĝiaj mirakloj. En tiu loko, kie Varja perdis la ringeton, ŝi enpikis malnovan abian branĉon en neĝon, kaj iris hejmen. Ŝi per pugnoganto forviŝis la larmojn, sed tiuj tutegale fluis kaj frostiĝis, kaj pro tio ŝiaj okuloj pikdoloris.

Avo Kuzma ekĝojis pro la tabako, plenigis la tutan kabanon per fumo, kaj pri la ringeto diris: – Ne malĝoju, stultulino! Kie ĝi falis, tie ĝi kuŝas. Vi petu Sidor-on. Ĝi trovos la ringeton al vi.

Maljuna pasero Sidor, ŝveligita kiel globeto, dormis sur stango. Dum la tuta vintro Sidor loĝis en la kabano de Kuzma, memstare, kiel mastro. Kun sia karaktero ĝi devigis estimi ĝin ne nur Varja-n, sed la oldulo-n mem. Kaĉon ĝi bekis rekte el teleroj, kaj panon penis elŝiri el ies manoj. Kaj kiam oni repelis la paseron, ĝi ĉiam ofendiĝis, flamiĝis, kaj komencis batiĝi kun iu, kaj pepi tiel furioze, ke pro timo kolektiĝis najbaraj paseroj, atente aŭskultis, kaj poste daŭre bruais, riproĉante Sidor-on pro ĝia fia karaktero.

En sekva tago Varja kaptis Sidor-on, envolvis ĝin en tukon, kaj iris en la arbaron. El sub la neĝo vidiĝis nur pinto de la abia branĉo. Varja sidigis Sidor-on sur la branĉon, kaj petis ĝin:

– Vi serĉu, fosu la neĝon! Povas esti, vi sukcesos trovi!

Tamen Sidor ekstrabis, malfideme ekrigardis al neĝo, kaj pepis: «Ha! Ha! Vi trovis stultulon!... Ha! Ha!» – ripetis Sidor, tuj sin ĵetis de sur la branĉo, kaj ekflugis reen al la kabano.

Do, la ringeto ne estis trovita.

Avo Kuzma tusadis pli kaj pli forte. En komenco de printempo li surgrimpis sur la fornon, tre malofte malsupreniĝis de sur ĝi, kaj pli ofte petis trinki akvon. Varja ĉiam alportis al li en fera ĉerpilo malvarman akvon.

Neĝblovado faris kirlojn super la vilaĝeto, kaj per neĝo superŝutis la kabanajn. La abioj kovriĝis per abunda neĝo, kaj Varja ne sukcesis en la arbaro trovi lokon, kie ŝi perdis la ringeton. Pli ofte ŝi kaŝis sin malantaŭ la forno, kaj mallaŭte ploris pro kompato al la avo, kaj insultis sin, – Stultulino!- ŝi flustris. – Mi tro petolis kaj faligis la ringeton. Jen punon al mi pro tio! Jenon al mi!

Ŝi ofte pugne batis sin kontraŭ la verto, sin punante, kaj avo Kuzma ĉiam demandis:

– Kun kiu vi bruas?

– Kun Sidor, – respondis Varja. – Ĝi iĝis tia neobeema, kaj ĉiam intencas interbatiĝi! Foje matene Varja vekigis pro tio, ke Sidor saltadis sur fenestrobreto, kaj per la beko batis kontraŭ vitro. Varja malfermis la okulojn, kaj tuj duonfermis tiujn. De sur tegmento, devancante unuj la aliajn, faladis longaj akvogutoj. Varmega lumo batis kontraŭ la fenestro. Kriegis monedoj.

Varja ekrigardis la straton. Varma vento ekblovis al ŝiaj okuloj, kaj malkombinis la hararon.

– Jen alvenis printempo! – ŝi diris.

Briladis nigraj branĉoj. Susuris, drivante de sur tegmento, malseka neĝo. Gravaspekte kaj gaje malantaŭ vilaĝa rando bruis la malseka arbaro. La printempo paŝis tra kampoj kiel juna mastrino. Post kiam la primavero ekrigardis ravinon, tuj en ĝi komencis glugli kaj ŝanĝbrili roĵo. La printempo iris, kaj post ĉiu ĝia paŝo sonorado de la riveretoj iĝis pli kaj pli laŭta.

La neĝo en la arbaro iĝis pli malluma. Komence sur ĝi aperis, falinta dum la vintro, brunaj koniferpingloj. Poste aperis multaj malsekaj branĉetoj, kiujn rompis ŝtormo ankoraŭ en decembro. Pli poste iĝis videblaj flavaj pasintjare falintaj folioj. Aperis makuloj de degelinta neĝo, kaj sur randoj de lastaj neĝamasoj ekfloris tusilagoj.

Varja trovis en la arbaro la malnovan abian branĉon, kiun ŝi enpikis en la neĝon, kie faligis la ringeton, kaj tiuloke komencis singarde permane forigi malnovajn foliojn, malplenajn abikonusojn, kiujn surjetis pego, branĉojn kaj putran muskon. Sub nigra folio subite io ekbrilis. Varja tuj ŝrikis kaj eksidis. Jen ĝi estas, la ŝtala ringeto! Ĝi tute ne rustiĝis.



Varja kaptis ĝin, surmetis sur la mezan fingron, kaj ekkuris hejmen. Ankoraŭ defore, alkurante al la kabano, ŝi ekvidis avon Kuzma. Li eliris el la

kabano, sidis sur ĉekabana teramaso. Blueta fumo de la malaltkvalita tabako leviĝis super la avo rekte ĉielen, kvazaŭ Kuzma sekiĝis sub primavera suno, kaj super li fumis vapore.



– Nu jen,– diris la avo,– vi, koketulino, elkuris el la kabano, kaj forgesis fermi la pordon. Pro tio facila venteto trablovis la tutan kabanon. Kaj tuj la malsano forlasis min. Nun mi finos fumi, prenos fendilon, preparos brullignojn, hejtos fornon, kaj bakos platkukojn el sekalfaruno.

Varja ekridis, karesis la avon laŭ liaj hirtaj grizaj haroj, kaj diris:

– Dankon al la ringeto! Ĝi resanigis vin, avo Kuzma.

Dum la tuta tago Varja portis la ringeton sur la meza fingro por ke ĝi plene forpelu la malsanon de la avo. Nur vespere, kiam ŝi preparis sin por dormi, ŝi demetis la ringeton for de la meza fingro, kaj surmetis tiun sur la ringan fingron. Post tio okazu la granda ĝojo. Sed ĝi ne rapidis alveni, kaj Varja ekdormis, ne atendinte ĝin.

Ŝi frue ellitiĝis, vestis sin, kaj eliris el la kabano.

Mallaŭta kaj varma aŭroro pendis super la tero. Sur ĉiela rando ankoraŭ brilis steloj. Varja ekiris al la arbaro. Ŝi haltis ĉe arbarrando. Kio sonoradas en la arbaro, kvazaŭ iu singarde periode movas tintilojn? Varja klinis sin, kaj tuj kunfrapis la manojn: neĝaj galantoj iomete balanciĝis, kapsignis al la aŭroro. Ĉiu floro eligis sonoron, kvazaŭ en ĝi sidis eta skarabo, kaj batis per la tarso arĝentan aranean fadenon. Sur pinto de abio kvinfoje ekbatis pego.

«La kvina horo!» – ekpensis Varja – Kia frumatenio! Kiel kvietas!»

Tuj alte sur branĉoj en ora aŭrora lumo ekkantis oreolo. Varja staris kun la duonfermita buŝo, kaj ridetante aŭskultis. Ŝi sentis fortan, varman karesan venton, kaj io apude eksusuris. Ekbalanciĝis korilo, kaj el sub nuksaj amentoj ekŝutiĝis flava poleno. Iu nevidebla singarde deflankigis branĉojn, trairante preter Varja. Renkonte al li, klinante sin, ekkukuis kukolo.

«Tamen kiu preteriris? Mi ne sukcesis rimarki!» – ekpensis Varja.

Sed ŝi ne konjektis, ke primavero mem trairis preter ŝi.

Varja tre laŭte ekridis, tra la tuta arbaro, kaj ekkuris hejmen. Kaj tre granda ĝojo – tia, ke ne eblas brakumi, – eksonoris, ekkantis en ŝia koro. La printempo ekbrulis ĉiutage pli kaj pli hele kaj gaje. Tia intensa lumo fluis de sur ĉielo, ke la okuloj de avo Kuzma iĝis pli mallarĝaj, kiel fendoj, kaj ĉiam ridetis. Kaj poste en arbaroj, herbejoj, ravinoj, kvazaŭ iu ŝprucigis miraklan akvon sur tiujn, ekfloris multaj miloj da floroj.

Komence Varja intencis surmeti la ringeton sur la montrorofingron por spekti la tutan mondon kun ĉiuj ĝiaj mirakloj. Tamen kiam ŝi ekrigardis al la ĉirkaŭaj floroj, gluecaj betulaj folioj, klara ĉielo kaj varma suno, aŭskultis intervokadon de kokoj, sonorado de akvo, interfajfado de birdoj sur kampoj, – ŝi ne surmetis la ringeton sur la montran fingron.

«Ankoraŭ estos tempo, – ŝi ekpensis. – Nenie en la tuta mondo estas tiel bone, kiel en nia Mohovoe. Ja kia ĉarmaĵo estas ĉi tie! Ne vane avo Kuzma diris, ke nia loĝloko estas vera paradizo, kaj forestas simila bona loko en la tuta mondo!»

*Tradukis Gennadij Ŝlepĉenko, Vladivostoko*







## Konferenco de la Akademio

Kiel en 2021 kaj 2022, la Akademio de Esperanto proponis al la publiko, la 14an kaj 15an de decembro 2023,

retan Konferencon de la Akademio konsistantan el naŭ prelegoj 20-minutaj. Ĉeestis pli ol kvardek spektantoj, kaj la prelegoj estas daŭre spekteblaj en la retejo de la Akademio:

[https://www.akademio-de-esperanto.org/konferencoj/konferencoj\\_3\\_2023.html](https://www.akademio-de-esperanto.org/konferencoj/konferencoj_3_2023.html).

La unuaj tri prelegoj koncernis la facilecon de Esperanto.

- **Renato Corsetti** prelegis pri evolutendencoj de la vortrezoro de Esperanto. Antaŭ la reformpropono de 1894, nur 78% el la radikoj de Esperanto estis francaj, anglaj aŭ sciencaj grek-latinaj. La reformpropono de 1894 anstataŭigis ne-latinidajn radikojn kiel tag- kaj ŝuld- per latinidaj, sed tiu reformpropono ne sukcesis. Tamen daŭre kreskas la kvanto de radikoj francaj, anglaj aŭ sciencaj grek-latinaj: ĝi atingis 92% en 1970.
- **Anna Lowenstein** prezentis la difinaron de la retejo [uea.facila](http://uea.facila), kiun ŝi prizorgas. Tiu retejo de UEA proponas al lernantoj mallongajn artikolojn verkitajn per facila vortrezoro el mil radikoj. Kiam artikolo bezonas vorton ekster tiu baza vortlisto, necesas verki ties difinon per la baza vortlisto kaj eventuale bildoj, kaj tiuj ĉi difinoj kolektiĝas kiel parto de la retejo, la difinaro, kiu daŭre pliriĝas.
- **Aleksandro Shlafer** pristudis, kio do vere igas Esperanton (mal)facila. Eĉ la tabelvortoj, la artikolo... estas malpli sistemece uzataj ol oni dezirus en simpla lingvo, kaj ĉu uzado de (ekzemple) *redakcio* anstataŭ *redaktejo* estas historia kaprico? Ĉu oni lasu spontanegan evoluon kompliki nian lingvon aŭ la Akademio kontribuu al pliigo de ĝia sistemece?


La tri postaj prelegoj ne rekte traktis la lingvon mem.

- **François Lo Jacomo** demandis sin, ĉu komuna lingvo pacigos la homaron? Tion ĉi ja deziris Zamenhof, sed paco postulas bonan interkomprenon kaj komuna lingvo ne sufiĉas: necesas valorigi kulturajn kaj eĉ individuajn diferencojn por plivastigi sian vidpunktaron. Diferenco ne estu subtraho sed suprentraho kaj en konstruado de tia mondo, paca pro interkompreno, ni partodonu prefere ol nur partoprenu.
- **Barbara Pietrzak** prezentis Jan Boudouin de Courtenay (1845 – 1929), fama pola profesoro pri kompara lingvistiko, speciale slavaj lingvoj, kaj pioniro de la teorio pri fonemo. Kiel vicprezidanto de la Delegacio pri alprenado de internacia lingvo en 1907, li vigle defendis Esperanton kontraŭ aliaj planlingvoj, interalie kontraŭ Ido.
- **Tim Owen** malkovrigis al ni preteratentitajn leterojn de Zamenhof. Eblas legi ilin en pluraj libroj kaj tie malkovri kelkajn asertojn de Zamenhof: ne nomu min

“polo”, la uzado de du specoj de literoj [majuskloj kaj minuskloj] estas tute superflua kaj sensenca, la lingvon anglan mi posedas tre malmulte, ktp...

Fine, la tri lastaj prelegoj temis pri la laboro de la Akademio mem

- **Markos Kramer** klarigis la laboron de la Akademio pri la duonvokalo *ŭ* en Esperanto. En 2013 la Akademio estis embarasata respondi al demando pri *ŭ*, kaj ĝi pli precize revenis al tiu demando dekon da jaroj poste, fine akceptante deklaron, kiu rekomendas uzadon de *ŭ* nur en sonkombinoj “aŭ” kaj “eŭ”, kaj ne (ekzemple) en “ŭa”, kiu plej ofte iĝu “va”.



**Jesper Jacobsen** prezentis la 10an Oficialan Aldonon al la Universala Vortaro, kiun akceptis la Akademio en septembro 2023 post pli ol unujara laboro kaj interŝanĝo de plurmil retmesaĝoj. Ĝi enhavas 420 novajn radikojn, ĉefe geografiajn nomojn, kaj kvarcenton da pliaj vortkombinoj kiel Ruĝa Maro, kun difinoj zorge poluritaj.

**Edmundo Grimley Evans** konkludis tiun Konferencon per proklamo de la premio Laŭro de la Akademio. Tiu ĉi premio estis kreita samtempe kiel la Konferenco de la Akademio por rekompenci verkon arte signifan, lingve perfektan kaj evidente kontribuantan al evoluigo de esperantlingva kulturo. Ĉi-jare gajnis Anna Löwenstein pro *La memoraĵoj de Julia Agripina*.

Tiu ĉi Konferenco de la Akademio estas unu el la manieroj diskonigi al vasta publiko la laboron de la Akademio kaj de akademianoj. Ĝi fariĝu nemaltrafebla evento de ĉiu mezo de decembro.

*François Lo Jacomo, sekretario de AdE*

## *Libroj*

### **Naciaj lingvoj kiel planlingvoj, aŭ lingvokreado kiel politiko<sup>2</sup>**

Kutime fakuloj pri lingvoj (lingvistoj, filologoj) malestime rilatas al Esperanto kaj ĝenerale al planlingvoj, malgranda kvanto de profesiaj interlingvistoj ne multon ŝanĝas tiurilate. tio, cetere, influas la socion: kiam oni aŭdas de eminentuloj esprimojn kiel “Esperanto ne estas lingvo”, aŭ “sensignifa laboratoria eksperimento”, formiĝas fona negativa rialto al la problemo ĝenerale. Tial, apero elsub “plumo” de fama lingvisto de libro, kiu ne faras distingon inter

---

<sup>2</sup> *Florian Coulmas. Gardantoj de lingvo. Dudek voĉoj tra la historio. El la angla tradukis Jan P. Sandel. Mondial, 2021. 466 p. ISBN 9781595694232*

lingvoj “naturaj” kaj “atrefaritaj”, sed konsideras formiĝon de evolintaj lingvoj kiel rezulton de lingva planado, estas senkonteste grava afero. Tia estas la libro de fama germana japanologo kaj sociolingvisto Florian Coulmas “Gardantoj de lingvo. Dudek voĉoj tra la historio” (angla originalo: *Guardians Of The Language: Twenty Voices Through History*, 2016). Traduko de ĝi al Esperanto far Jan Sandel estas, sendube, grava kontribuo al nia internacilingva kulturo, donante grandan materialon por esploro, citado, meditado kaj evoluigado de ideoj de planlingvistiko.

La libro rakontas en kronologia ordo pri kreantoj kaj normigantoj de diversaj literaturaj lingvoj, ilia adaptado al certaj bezonoj de la uzantoj ktp. La elektitaj de la aŭtoro 20 protagonistoj estas teologoj, poetoj, filologoj, reĝoj, ĉefministroj, ŝtatestroj – sed ili ĉiuj interesiĝas pro diversaj kialoj pri plibonigo de lingvoj (ne nepre siaj denaskaj!) kaj multon sukcesis tiukampe. Ni saltas de epoko ak epoko, de kulturo al kulturo, de kontinento al kontinento kaj vidas, kiel tiuj tute diversaj homoj okupiĝis pri lingvoplanado kaj kiel (foje – ne tuj) atingis siajn celojn. Inter ili troviĝas ankaŭ nia Majstro Zamenhof, kiui estas konsiderata kiel unu el tiuj egalrajtaj sur tiu tereno fakuloj!

Kio tre gravas, kiam ni esploras biografiojn kaj agadojn de tiuj lingvoreformuloj, ni ĉiam vidas certan politikan celon kaj koncernan ideologion, kiu puŝas ĉiun konkretan personon al la celo. Do, lingva planado estas nepra rimedo de politiko – ne hazarde inter protagonistoj de la libro tiom abundas profesiaj pooklitikistoj.

Mem la aŭtoro, klasigante la agadirektojn de la lingvoreformisioj, trovas kvin kontrastajn parojn de streboj en ilia kreado: konservado – modernigo, unikeco – universaleco, plureco – unueco, liberigo – dominado, egalrajteco – elitismo. Certe, tiuj 10 elementoj en ilia laboro en diversaj kombinoj havas certan rolon, sed mi vidas pli grava malsamajn politikajn ideologiojn, kiuj stimulis iliajn laborojn. Mi donos ekzemplojn el la libro.

Imperiismaj ideologioj estas reprezentataj de Alkuinus el Jorko (735-804), kiu strebis normigi la latinan lingvon por bezonoj de la imperio de Karolo la Granda; Sibawayh (760–796), kiu normigis la araban lingvon por plifaciligi ĝian uzadon kiel oficialan lingvon en Abasida imperio; Antonio de Nebrija (1444-1522), kiu priskribis kaj normigis la hispanan lingvon cele al ĝia instruado en la nove konkeritaj landoj...

Plejmulte renkonteblas, kompreneble, la stimuloj de naciismaj ideologioj – nove kreata, aŭ sur nova bazo establiĝanta nacio ja bezonas unuecan stabilan lingvon. Inter ties adeptoj ni vidas tiajn homojn, kiel Danto Alighieri, (1265-1321), kiu faris sintezon de italaj dialektoj por krei unuecan literaturan dialekton por iam unuecigi Italion; Adamantios Korais, (1748-1833), kiu okupiĝis pri purigo de la novgreka de diversaj alimiksajoj (ĉefe – turkismoj), pruntitaj dum politika mallibero de Grekio, Ueda Kazutoshi (1867-1937), kiu transformis la japanan lingvon je la plenvalora nacia lingvo, Eliezer Ben-Yehuda (1858-1922), kiu sukcesis transformi la antikvan kultlingvon en florantan, por ĉiu aspekto de la moderna vivo plene funkcia nacia lingvo, Mustafa Kemal Atatürk (1881-1938), stimulantinta skribsisteman, ortografian kaj leksikan reformon, kiu draste ŝanĝis karakteron de la turka lingvo, kaj multajn aliajn, kiel kardinalo Richelieu, inciinto de Franca Akademio, kaj Katerina la Granda, fondinta la Russian Akademion...

# GARDANTOJ



# DE LINGVO

*Dudek voĉoj tra la historio*

Tradukis Jan P. Sandel

MONDIAL

Ĉion estas trege interese legi, mi supozas, ke eĉ la plej kleraj lingvistoj ne scias multajn informojn, troviĝantaj en la libro. Kompreneble, ĝi ne estas elĉerpa: ja mi volonte vidus en ĝi eseojn pri Geoffrey Chaucer, Martin Luther, Vuk Karadžić kun Ljudevit Gaj, Ivar Aasen kaj multaj aliaj, kiuj havas ne malpli da “lingvagardaj” meritoj, ol pritraktitaj en la libro personoj. Nu, la grandeco de la libro estas limigita (466 paĝoj estas jam multe!), kaj, eble, iu daŭrigos la laboron. Sed ni ja devas danki al la aŭtoro kaj la tradukinto pro la ebleco legi tiun valoregan libron!

**Nikolao Gudskov**

*Unue publikigita en “Monato” 45a jarkolekto, januaro 2024/01, pp. 26-27*

CERBE kaj KORE

n-ro 35 (103), decembro 2023

*Kultura suplemento al la revuo “Ponto” n-ro 137*

“Ponto” estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo “Rusia Esperantista Unio”  
*Oni rajtas uzi kaj represi ĉiujn materialojn de la eldono nur kondiĉe de ĝusta indiko de la fonto*

CKK atendas viajn prozajn, poeziajn, interlingvistikajn, instru-metodikajn kaj sciencopopularajn kontribuojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov [nikolao@yandex.ru](mailto:nikolao@yandex.ru).

*Estraro de Rusia Esperantista Unio*